

# Beneluksa Kongreso

En Charleroi (Karloreĝo), je promendistanco de la ĉefa stacidomo, okazis de la 19a ĝis la 22a de septembro 2019 la Beneluksa Kongreso (BK). Ĝin oficiale organizis Association pour l'Espéranto, la valona Esperanto-asocio. En praktiko la LKK konsistis el aktivuloj de tuta Beneluksa: Valère Doumont (valono) respondecis pri loĝigo, manĝoj kaj financoj; Yves Nevelsteen (flandro) pri la retejo kaj programo kaj Spencer van der Meulen (juna nederlandano) pri “dancigo kaj kantigo”.

La kongreso komenciĝis jam en ĵaŭdo. Post manĝo en loka restoracio, ni posttagmeze vizitis minejo-muzeon Le Bois du Cazier. La viziton gvidis profesia gvidisto en la franca lingvo; Valère tradukis ĉion al Esperanto. Oni montris du filmetojn: unu en la franca kaj unu en la nederlanda, por la lingva ekvilibro. Vespere Yves montris fotojn kaj filmetojn pri kelkaj someraj renkontiĝoj; precipe pri Baltiaj Esperanto-Tagoj en Litovio kaj Somera Esperanto-Programado en Slovakio.

Ekde vendredo ĉiumatene okazis pluraj kursoj. La fokuso estis paroligo; pluraj homoj nur kelkfoje jare havas la eblon paroli Esperanton kun personoj kiuj havas alian denaskan lingvon. En nia multlingva regiono tamen estas multaj ebloj tiurilate! Instruis interalie Françoise Pellegrin (komencintoj), Kiki Tytgat (progresantoj) kaj Lode Van de Velde (progresintoj).

La programo estis regule adaptita laŭ la emo de la ĉeestantoj. Patricia Gobert gvidis nin sabatmatene tra la urbo, ĉar laŭ kelkaj la vetero estis tro bona por resti interne kaj ne al ĉiu plaĉis la programero lingvokurso. Ĉar anticipi la celo estis dinamike surloke adaptadi la programon (kaj por ŝpari monon kaj la medion), ne estis kreita BK-programbroŝuro, sed ĝisdatigata versio afiŝiĝis sur du pordoj.

La programo estis pli varia ol kutime. Okazis prelegoj pri korpa humiĝado (Monique Van Roy kaj Guy Basyn), pri la kvartagaj marŝoj en Nimego kaj pri proverbaro.net (Rob Keetlaer), prezentiĝis memkreitaj ludoj (Philippe De Vos kaj Lode), okazis biergustumado (teorio kaj praktiko) far bierfaristo Valère, popolaj dancoj, kunkantkoncerto, prelegoj pri oftaj eraroj kaj novaj vortoj, pri markonomoj (Yves) kaj Jean-Pol Sparenberg prelegis pri Carol'Or, loka kaj kroma pagilo en la regiono de Charleroi. Homoj eĉ plendis pri tio ke ili estis foje devigataj elekti; kutima problemo dum renkontiĝoj kun riĉa programo.

Kunvenis en Charleroi la estraroj de Belga Esperanto-Federacio, Flandra Esperanto-Ligo kaj Association pour l'Espéranto. Kiel kutime, Gerd de FEL prizorgis la libroservon. Haveblis interalie nova nederlandlingva kurso por komencantoj, nova versio de *Karlo* por nederlandlingvanoj kaj *Esprimaro*, nova verko de Petro Detsmet'. Parto de la planitaj libroprezentadoj ne okazis, ĉar aldoniĝis al la programo tre interesa prelego de John Murray pri Nord-Irlando.

Dimanĉmatene okazis sufiĉe sporta gvidata promenado tra la centro de Charleroi: krudmonto + industriaj lokoj. Lastmomente aldoniĝis kroma programero: arta promenado en la malalta kaj alta urboj de Charleroi (Georges Sossois).

Homoj venis interalie el Flandrio, norda Nederlando, Germanio kaj eĉ Irlando. Ĉeestis relative multaj denaskaj parolantoj de la nederlanda. 70 homoj ne estas amaso, sed estas lastatempe multaj renkontiĝoj en Beneluxo, do konklude kreskas la movado. Venis ĵurnalisto de radio RTBF kaj kelkaj novuloj; homoj kontentis. Sed ĉiam eblas fari pli bone; precipe se temas pri kunlaboro kaj transdono de spertoj.

Ben Indestege proponis diskutrondon pri ontaj Beneluksaj Kongresoj kaj instigis, ke oni pli kunlaboru kaj profesiigu la organizadon. La BK okazis ankaŭ en 2018 (Limburgo) kaj 2017 (Lier), sed organizantoj ne vere transdonis spertojn. Ekkestis la ideo krei fiksan retejon por la kongreso kaj la beneluxsa agado ĝenerale: [www.beneluxso.eu](http://www.beneluxso.eu). Ĉar tempo pasas rapide, la kongresejo estas ege facile atingebla kaj moderna, ni reokazigos la Beneluxsan Kongreson en 2020 samloke en Charleroi kun pli granda LKK kaj kunlabore kun la teamo kiu planas en 2021 ĝin okazigi en la regiono Akeno-Maastricht-Voeren. Ĉi ĉio ebligis nin ŝpari tempon kaj energion; ni povos plibonigi kaj profesiigi nian agadon.

Sub instigo de Rob Keetlaer, ni aldonos informojn kaj fotojn pri la pasintaj kongresoj al la retejo. Jam tro da retejoj malaperas; ni bone zorgu pri nia heredaĵo.

La Beneluxsa Kongreso estas parto de pli granda plano por kunlaborigi homojn el Okcidenta Eŭropo, inkluzive de Germanio, Francio kaj Anglio. Tial okazos ekzemple grupa vojaĝo de Antverpeno al la studosemajnfino de Esperanto Nederland fine de novembro kaj flandro kunorganizos la jarfinan renkontiĝon Luminesk'.

**Yves Nevelsteen**



Eĉ dum bierumado paperoj estis surtable.